## Gratulo el Danlando

S-ro Preben Bagger, emerita dana inĝeniero kaj vojaĝinto al Usono kaj Kanado, bonkore skribis jen:

„Koran dankon pro la jarkolekto de ***Inter Ni***. … mi nur dum Pasko komencis foliumi ĝin.

„Sed trafoliumadon baldaŭ anstataŭis tralego, ĉar ege min surprizis la tre alta nivelo, ne nur lingve, sed ankaŭ enhave. Ĉe ni lokaj bultenoj ofte estas ne tre interesaj, kaj lingve nematuraj. Do, gratulon!"

Post multaj horoj da redaktado kaj kompostado, estas tre agrable al ni iom ripozi en laŭdlumo. Dankon, Preben Bagger.

— la Redakcio

## Arbara Averto



Nuntempe en norda Kalifornio estas problemo pri sovaĝaj ursoj en la arbaro. La registaro rekomendas, ke vagantoj en la arbaro kunportu pipropistolojn por defendi sin kaj alkroĉu ĉenojn de sonoriletoj ĉirkaŭ la maleoloj por averti la ursojn.

Estas du specioj de ursoj: nigraj kaj grizaj. Ili estas facile distingeblaj: La nigraj ursoj estas aŭ brunkoloraj aŭ nigrakoloraj, malgrandaj, preferas ne renkonti homojn, kaj efektive ne estas tiom ferocaj. La grizaj ursoj estas grizaj, tre grandaj, furiozaj, odoras de pipro, kaj oni povas aŭdi tintadon en la ventroj.

## Cerbumilaj Respondoj

En la maja numero, estis tri cerbumiloj de Prof. Ladislaŭ SIMON en Oradea, Rumanio. Ĉu vi povis solvi ilin? Gratulon al Profesoro Léo Kpakpo-Koumi Y. Adovi de Lomé, Togolando, kiu jam sendis al ni la ĝustajn respondojn:

**3. B = 8** **2. 4 infanoj** **1. 82 piedoj**